# Francilia federacio
# KomitatKunsido (KK) 12/06/2024

## Partopreno

- Raymonde Coquisart, vic-sekretario (RC) ĉeestas (rete)
- Pierre Gauthier, vic-kasisto (PG) ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ne povas ĉeesti
- Aleks Kadar, prezidanto (AK) ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) ĉeestas
- Didier Loison, kasisto (DL) ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers, sekretario (LPI) ĉeestas
- Sabrina Rusch (SR) ĉeestas (rete)
- Guillaume Vera-Navas (GVN) ekskuzis sin

## Ekde la antaŭa komitatkunsido

La protokolo de la  Ĝenerala Asembleo 16/03/24 estis aprobita kaj enretigita al https://esperanto.paris/membro-kunvenoj

Ekspozicio okazis dum unu monato 17/04-17/05 en Humathèque de la Campus Condorcet en Aubervilliers, kie videblis la paneloj pri Lucien Peraire jam prezentitaj lastjare en la stacidomo Versailles Chantiers.

La foiro pri matematikaj ludoj okazis 23/05-26/05. Organizis FLJ AL Deĵoris Elisabeth Barbay, FLJ, Lucien Bresler, Gérard, PG, Loïc Morvan, DL, Sarah, AL. La rezulto estas kontentiga. Estis sufiĉe da deĵorantoj, ni ne estu pli ol 3 samtempe. La evento plaĉis al la deĵorantoj, ĉar la publiko neniam malfavoris eon kaj ĝenerale estis mense malfermata. Plejofte la lernejanoj sciis nenion pri esperanto. Ni montris afiŝon pri Mundolingua kaj ili reciproke afiŝis pri ni, Mundolingua plu haveblos nian kalendaretojn. Necesas anstataŭigi aŭ ripari (rekudrigi la zipon) la sakon de la budofono. FLJ raportos al RC.

En majo kaj junio okazis balotkampanjo por la eŭropa parlamento. La partio Eŭropo Demokrato Esperanto prezentis sin, kaj membroj de nia feredacio kandidatis aŭ helpis diversmaniere. Pro la balotkampanjo ŝajnas ke la intereso pri la lingvo esperanto kreskis, ekzemple okazas pli da demandoj en Guglo, pli da aliĝoj en ikurso. Tial ni probable ricevos pli ol kutime da informpetoj pri surlokaj kursoj por komencantoj.

## Kursoj

Por respondi al informpetoj kaj reklami, ni bezonas scii kiel eble plej frue kiujn kursojn ni proponos dum la jaro 2024-2025, kun precizaj informoj : tago, horoj, prezoj, komencodato.

- cours pour débutants en présentiel, jeudi de 19h00 à 20h30, PG jes
- cours intermédiaire en présentiel, mercredi de 18h30 à 20h, MP Jes volonte ! :)
- cours intermédiaire en ligne, vendredi de 18h00 à 19h30, MG ne respondis
- cours supérieur en présentiel, mardi de 18h30 à 20h00, FLJ vidos

Dum la lastaj kursoj, la instruistoj kuraĝigu kaj instigu siajn lernantojn al realîĝo por la venonta jaro, en pli altan nivelon. Komence de septembro, la instruisto rekontaktu siajn eksajn lernantojn por instigi denove.

La kursoj komenciĝos mardon la 1an de oktobro.

Prezoj de la kursoj, por la tuta jaro, inkludante la kotizon al la asocio:

- surloka kurso: normala prezo 109€, malalta prezo por senimpostuloj 45€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 30€
- reta kurso: normala prezo 59€, malalta prezo por senimpostuloj 20€, malalta prezo por junuloj malpli ol 35-jaraĝaj 15€ (ĉar la kotizo de JEFO altiĝis de 5€ al 15€)

Reklamilo pri la kursoj : kiam ĉiuj informoj estos fiksitaj, LPI ĝisdatigos nian tutkoloran A3 afiŝon pri kursoj.

# Varbaj eventoj en septembro

## Festo de asocioj en Paris Centre

Ĝi okazos sabaton 14/09 10h-17h30 ĉe la urbodomo rue Eugène Spuller. Senpaga budo. Atentu, DL tiudate plej probable ne liberos. Prizorgos la aliĝon : LPI Deĵoros : PG, RC, eble AL, eble SR

## Homarfesto

Ĝi okazos 13-15/09, plu en Brétigny-sur-Orge. Tiu loko estas fora por multaj membroj. PG diras ke Espéranto-France dediĉis buĝeton de 3.000€ por ĉiuj salonoj. Necesas dum la somero serĉi deĵorantojn per mesaĝoj en dissendolistoj kaj sociaj retoj kaj krei framadaton. Organizos AL. AK petos informojn al la organizantoj de la festo.

## Malfermaj pordoj

Sabaton 21/09. Deĵoros : SR, AL, LPI, PG. eble RC...SR preparos afiŝon kaj flugfolion pri la malfermataj pordoj por disdoni dum la 2 antaŭaj varbaj eventoj kaj afiŝi en la sidejo. Eblaj agadoj : ludoj, kvizoj, niveltestoj...

## Salon de l'Education

Probable ĝi okazos en oktobro aŭ novembro en Parizo. La prezo de budo estas alta, sed la publiko estas nova kaj juna. Se restas iom da mono en la buĝeto de Espéranto-France pri salonoj post la Homarfesto, ni provos marĉandi budon. PG, bonvolu informi Espéranto-France pri niaj planoj en Homarfesto kaj Salon de l'éducation. Organizos AL FLJ

## Aliaj ideoj por varbi

Fulmkurso, prelego, staĝo...? Neniu voluntulas.

# Zamfesto

Respondecas RC. Okazis kunsido kaj diskutoj kun la pariza grupo de SAT-amikaro kaj la fervojistoj pri la Zamfesto(j) en decembro. Raporto de RC :

PROGRAMO (PROVIZORA) ZAMENHOFA FESTO 2024

14a 30 PREZENTO DE LA ASOCIOJ 15 mn

- Fabeloj de la verda pigo (Elizabeth) 10 mn
- Dancoj (fervojista asocio) 15 mn
- Zamenhofaj Proverboj (Bertrand) ?
- Poemo REVE (Eo fervojistoj) 10 mn
- Rakonto pri PEREIRE (Régis) ?
- Lumdancoj (Elizabeth) 5 mn
- Prezento de noveldonitaj libroj ?

16a PAŬZO - LOTERIO - LIBROSERVO - TRINKEJO

16a30 Ŝercoj (Raymonde) 20 mn

- Kantisto (Guillaume ARMIDE ?) 45 mn

17a 40 FINO

La dato estas 14/12/24.

La loko estas rue Traversière, kutima loko de la fervojistoj, do la fervojistoj luprenos la lokon senpage, ili prizorgos la loterion kaj la programerojn far fervojistoj.

Diskutendas: Ĉu teatraĵo 1h (*Artikolo 330* de Courteline) far iu SAT-amikarano ? Ni preferas kantiston.

Nia federacio prizorgos la programeron pri esperantista kantisto. Kiun elekti, por venigi spektantojn : Guillaume Armide, Kajto, Inicialoj dc (i.d.c.), Jonny M, Armel Amiot ? Ni decidos leginte la proponojn de la kantistoj, kiujn RC sendos.

Prezento de kelkaj libroj eldonitaj de Esperanto-France aŭ de SAT(-Am), eta libroservo kun la prezentitaj libroj : organizenda kun SAT-Amikaro.

Trinkejo : ni prizorgos

# Michèle

Ŝi malbone fartas. AL tamen provos venigi ŝin al la sidejo por ordigi ŝiajn aĵojn, aŭ vizitos ŝin.

# Babilrondo de gejunuloj

Ĉiuj kontentas. Venas 4 ĝis 10 homoj. AL ne certas ĉu eblos daŭrigi. La prezento de TEJO okazos en oktobro. Intervjuo menciota en artikolo de gazeto *L'âge de faire* en septembro. AL serĉas kiel varbi gejunulojn kaj bonvenigos ideojn.

# Projektoj

- Nia ŝranko: AL komencis ordigi la ŝrankon
- Finfermi la asocion Espéranto 94: AL, RC, PG, FLJ Tiucele okazos ĜA 15/06
- Subglasoj: GVN?
- Animation pour les habitants dans les cours d'école de Paris Centre le samedi: GVN provos?
- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "Place des arts"): DL, LPI, PG, nenio nova
- Paĝmarkiloj: AL, kiam ne plu restos da
- Ĉapeloj : same, multaj vendiĝis en Strasburgo
- Kontakti la mezlernejojn pri la projekto Multlingva akcelilo (MLA): dormanta projekto
- Civitaj dungitoj de Espéranto-France : EF dungos ĉi-jare
- Badges : SR proponas krei novajn

# Agadoj

- Ĝemelurbo kun Romo: MG
- Legoklubo: MG
- Kursoj: PG, MG, FLJ
- Junularaj agadoj: AL kun la junaj membroj
- Informado pri ekzamenoj: FLJ
- Esperanto-kafejo: GVN ĉiumonate
- Espéranto café croissant: okazos 15/06 je la 3a ptm, samtage kun Esperanto kafejo
- Kulturaj vesperoj: PG, LPI, Régis Fournier, AK ĉiumonate
- Prelegturneoj: FLJ, ne okazis sed eble denove okazos

Notu bone 1a: post evento, iu partopreninto aŭ la organizanto sendu informojn (foton, mallongan priskribon en la franca) al raymonde.coquisart@yahoo.fr por publikigo en la reta monata gazeto Esperanto-Aktiv

# Respondeculoj pri informkanaloj (memore)

Informi pri niaj eventoj. La unua kanalo estas la retejo https://esperanto.paris la aliaj kanaloj reeĥas la informojn. Ekestas kelkaj ŝanĝoj.

- Retejo DJ https://esperanto.paris/
- Facebook DL GVN https://www.facebook.com/esperanto.paris
- X PG SR https://twitter.com/esperanto_paris
- Mastodono PG https://esperanto.masto.host/@esperantoparis
- Dissendolisto Amikaro LPI https://groups.google.com/g/amikaro-francilio
- Telegramo AL https://web.telegram.org/z/#-1081874369
- Amikumu LPI https://amikumu.com/
- Eventa Servo DJ AK https://eventaservo.org/o/Esperanto-Paris ALeks petas aliron
- Vacapo: AK SR (Viktoro) https://chat.whatsapp.com/IjLHyHenBGDFOv8yPB2Xt3
- Dissendolisto de Paris Centre pri venontmonataj eventoj DL
- Instagramo : SR kontaktos Lulu Testudo kaj eble reprenos la konton de JEFO, kiun ŝi kreis

# Niaj retpoŝtadresoj (memore)

Adresoj kreitaj de nia federacio, administrataj de prezidanto kaj sekretario

- komitato-francilio@googlegroups.com resendas al la komitatanoj
- membraro-francilio@googlegroups.com resendas al la membroj aliĝintaj por la jaro 2023-2024 (mane ĝisdatigata

16/03/24 sed ne poste)

Adreso kreita de nia federacio

- amikaro-francilio@googlegroups.com resendas al ĉiuj interesatoj pri niaj eventoj, iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi

Adreso kreita de Espéranto-France, ne uzita

- francilio@esperanto-france.org iu ajn povas mem aliĝi kaj malaliĝi, vidu ĝian priskribon https://esperanto-france.org/sympa/info/francilio

Kontaktadreso de nia retejo esperanto.paris, la resendadon administras Emmanuelle Richard

- info@esperanto.paris resendas al la estraranoj kaj Said Baluŝi

# Venonta KK

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos 06/09/2024 je 19h15, mikse. FLJ prizorgos la retan aliron.

# FINO DE LA KK